

Esperanto Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2014

Jarkolekto 1 - Numero 4

ESPERANTO -

MEDALOJ



+

MONEROJ

KOMPILIS KAJ ELDONIS : HANS JANKOWSKI
REDAKTIS KAJ REALIGIS: ALFRED CONZETH

ALDONO al "LA RADSALTANTO" N° 1 / 1990

La 1a jarkolekto estas omaĝo al Hans Jankowski

ENHAVOTABELO

de oktobro 2014

Titola paĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni !	3
Moneroj & medaloj :	4
<i>“Riga Stelo” : unua Esperanto revuo en Latvio</i>	
<i>40 jara datreveno de la venko super la hitleranoj</i>	
<i>Omaĝe al Vilho S. Setälä</i>	
<i>Nova Esperanto-medalo de Herzberg am Harz (2014)</i>	
Medalistoj: 1. Jānis Strupulis (°1949)	9
Aspektoj de numismatiko	10
2 La stato de Konservado de Moneroj, Medaloj kaj Monpapero	
Historiaj aspektoj: Framasona medalo 1913-2013	13
Terminaro: alfabeto listo (3)	14
El la gazetaro: “Ekvadoro lanĉas digitalan monunuon”	15
Retpoŝto	16
Anoncoj & Eventoj	20
Kolektaĵoj	21

De ni por ... ni !

La unua jaro de ENA kaj la unua jarkolekto de nia revuo baldaŭ estos finitaj. Koncerne la membrokvanton ni povas esti kontentaj. Jen la aktualaj listoj:

Jen listo de la unuopaj membroj:

1	Belgio	11
2	Ĉeĥio	1
3	Germanio	8
4	Hispanio	1
5	Finnlando	1
6	Francio	1
7	Nepalo	2
8	Nov-Zelando	1
9	Pollando	1
10	Slovakio	1

Listo de muzeoj kaj bibliotekoj:

1	Aŭstrio	1
2	Belgio	1
3	Britio	1
4	Germanio	2
5	Ĉeĥio	1
6	Hispanio	3
7	Japanio	1
8	Kroatio	1
9	Nederlando	1
10	Uzbekio	1

En ĉi-numero vi trovos kvar medalojn en la prikoncerna rubriko, krome du novajn rubrikojn: “Historiaj aspektoj” kaj “El la gazetaro”.

Ni danke salutas du membrojn kiuj kunlaboris kun ni por kompletigi ĉi-numeron. Sinjorino Elda Doerfler (Italio) kaj sinjoro Herman Deceuninck (Belgio) atentigis nin pri tre interesa artikolo en “Heroldo de Esperanto” pri la framasona loĝio “Esperanto” en Parizo (Francio). Krome s-ino Doerfler havigis al ni bonkvalitajn fotojn de la framasona memoriga medalo el 2013. Dankon al vi ambaŭ!

Por la dua jarkolekto de “Esperanta Numismatiko” ni jam povas anonci kiel ĉefa temo la ikonajn, arĝentajn “monerojn” de 1-spesmilo (vidu ankaŭ la titolan paĝon!) kaj de 2-spesmilo(j). Krome ankaŭ la historiajn faktojn pri la spesmilo-monsistemo kiel klopodo organizi universalan monsistemon laŭ la moto “Unu mondo – unu lingvo – unu mono”. Eble ankaŭ aperos novaj rubrikoj(?). Ĉu vi havas propono(j)n? Ne hezitu!


Ni havas alian gravan peton por vi ĉiuj: se ĉiu membro povus / provus varbi unu nuran novan membron, je la fino de 2015 ni havus minimum 56 membrojn! Ĉu vi akceptas la defion?

*Tutkore ni deziras al vi
bonan kaj prosperan
novan jaron 2015!*

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

“Riga Stelo”: unua Esperanto revuo en Latvio



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 63 mm

Jaro: 1983



Kvanto: nekonata

Pezo: nekonata

Diko: nekonata

Medalisto: Jānis Strupulis

Averso:

Busto de Vladimir Szmurlo kaj skribo: “VLADIMIR SZMURLO 1865-1931”.
Monfarejstra(?) simbolo kaj 83 (=1983)

Reverso:

Stelo kaj skribo: “RIGA STELO 1910” “LA UNUA ESPERANTO REVUO EN LATVIO”

Rimarko 1:

Jankowski mencias: “Ekzistas kopioj el bronzo kaj argilo”

Rimarko 2:

Vladimir Szmurlo eldonis la unuan Esperanto revuon en Latvio, nome “Riga Stelo”-n

Tipo A 2 – Esperanto medaloj kun ne-esperanta(j) aldono(j)

40 jara datreveno de la venko super la hitleranoj



Lando: Pollando

Metalo: latuno

Diametro: 69,50 mm

Jaro: 1985



Kvanto: nekonata

Pezo: 145 gr

Medalisto: Tadeusch Tschórzeuski

Diko: 5 mm

Averso:

La Brandeburga Pordego en Berlino. Du glavoj detruas svastikon. Supre en la pola, sube en Esperanto: “40^a DATREVENO DE LA VENKO SUPER LA HITLERANOJ”

Reverso:

En la centro kuranta virino flugigas kolombon. En Esperanto kaj en 14 aliaj lingvoj aperas la vorto “LIBERECO”.

Flanke de la dekstra piedo: T.T.(la inicialoj de la medalisto). Tute sube WK.SD CHEŁM (vidu rimarkon 1)

Rimarko 1:

La medalo estis eldonita de la vojevodia komitato de la demokrata partio en Chełm.

Rimarko 2:

La ŝtata monofarejo en Varsovio en 1985 faris ĉi- medalon memorigan pri la 40a datreveno de la venko super Hitler kaj la fino de la dua milito en Eŭropo.

Tipo A 2 – Esperanto medaloj kun ne-esperanta(j) aldono(j)

Omaĝe al Vilho S. Setälä (4.4.1892-11.4.1985)



Lando: Finnlando

Kvanto: 500

Metalo: latuno

Pezo: 245 gr

Diametro: 70 mm

Medalisto: Heikki Varja

Jaro: 1979

Diko: 9-12 mm (reliefo)

Averso:

En la centro kapo de Setälä, maldekstren en profilo. Marĝena skribo supera: “KAJ LUKTI FIDELE POR LUMO”. Suba skribo: “VILHO / 1892 4.4. / SETÄLÄ”. Dekstre inter la skriboj: kvinpinta stelo. Oblikve sub la kolo: H. VARJA / 1979

Reverso:

Mondomapo kun la samaspekta arkforma skribo en Esperanto kaj en la finna: “INTERNACIA LINGVO / KANSAINVALINEN KIELI”

Rando:

TILLANDER FINLAND

Fontoj:

Vikipedio: Setälä

Hans Jankowski: “Esperanto-MEDALOJ + MONEROJ” 1990

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

Nova Esperanto medalo de Herzberg am Harz



En numero 3 de la 1a jarkolekto, ni jam pritraktis sur la paĝoj 4 > 7 la 4 medalojn el Herzberg de la sama medalisto.

Lando: Germanio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: 360 gr

Diametro: 112 mm

Medalisto: Peter Götz Güttler

Averso:

Ĉirkaŭa skribo: INTERNACIA FILMEVENTO – 2014 – G – PER ESPERANTO

En la mezo: stiligita bildo de pionira filmilo kun la lenso maldekstren

Maldekstre: tri-etaĝa konstruaĵo kun tegmento sur granda soklo, kio montras kiel filmo estas projektata sur ekranon

Supre: stelaro kun 15 steloj. La stelo ne nur estas simbolo de Esperanto, sed ankaŭ aktoroj ofte ricevas la kromnomon “kinostelo”, “filmstelo” aŭ eĉ “stelulo”

Dise: amaso de tre etaj figuroj kiuj simbolas la publikon

Rando: la inicialo **G** de Güttler

Reverso:

Blazono de la urbo Herzberg kun virleono kaj vircervo.

Ĉirkaŭa skribo: “LA ESPERANTO-URBO-HERZBERG AM HARZ. DIE ESPERANTO-STADT.” Sub la blazono: “KROMNOMO DE: 12.07.2006”

Rimarko 1:

Medalo farita okaze de “Esperanto-filmfestivalo en Herzberg am Harz” je la 3a de oktobro 2014. Premiitaj estis kvar personoj pro sia kelkjardeka filmagado dum E-kongresoj, seminarioj ktp: R. Kunz (Stuttgart), L. Peters (Herzberg), R. Dobrynski (Pollando) kaj D. Smolic (Paderborn).

Rimarko 2:

Kvar medaloj montras la literon **G** ne nur en la rando, sed ankaŭ sur la averso.

Rimarko 3:

Nur la medalo pri Góra havas la literon **G** sur la reverso anstataŭ sur la averso!

ERATUMO

En jarkolekto 1, numero 3, p.15 estas anstataŭigende “Güttler-Medaillen, gegossene Münzen” per “**Gegossene Sichten und Welten. Peter Götz Güttler. Katalog der Medaillen 1971-2011**”

MEDALISTOJ

Jen la unua serio de nova rubriko pri fakuloj kiuj profesie desegnis, skulptis aŭ frap(ig)is esperantajn numismatikaĵojn, kiel medalojn kaj monerojn.

1. Jānis Strupulis (°1949)



Jānis Strupulis naskiĝis en Vecpiebalga (Latvio) la 28an de januaro 1949. Li finstudis en la branĉo de skulptoarto en la Latvia Ŝtata Akademio de Arto en 1973.

Depost la jaro 1971 li ekspoziciis 300-foje en 23 diversaj landoj, i.a. en Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hungario, Japanio kaj Luksemburgo. En 6 diversaj landoj li 31-foje sole ekspoziciis.

Membro de “La Artista Unio de Latvio”.

Membro de “Latvia Desegnista Societo”.

Membro de FIDEM (Fédération Internationale de la Médaille d’Art)

Honora membro de “Latvia Akademio de Sciencoj”.

Prezidanto de “Latvia Arta Medalo Klubo”.

Ekde 1975 li kreis ĉirkaŭ 640 medalojn. Krome li desegnis plastikan medalon pri la “Nacia Emblemo de Latvio” kaj modelojn de oficialaj latviaj moneroj.

Premiita en la “Trienalo de Balta Medala Arto” en 1986 kaj 1989, “Grand Prix” en 1995.

Ricevis orajn medalojn okaze de la 10a (1992) kaj de la 12a (1996) “Dantaj Bienaloj”. Krome la Premion Paul Stradin en 1997.

Liaj verkoj troviĝas en 57 muzeoj en 16 landoj.

Liaj esencaj verkoj estas medaloj kaj grafikaĵoj. Tamen li krome skizis oficialajn poŝtmarkojn kaj monerojn por la nova latvia ŝtato.

Li abunde kontribuis al la kreado de Esperanto-medaloj. Dum la jaroj 1976 ĝis 1989 li faris 21 diversajn Esperanto-medalojn. El tiuj mi priskribas kaj montros en ĉi numero unu medalon el 1983, la nuran pri kiu ENA ĝis nun posedas kolorajn kopiojn + informojn.(> “Medaloj kaj moneroj”)


Fontoj: Interreto + Hans Jankowski “Esperanto-Medaloj 1912-1995” (1995)

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

2. La stato de konservado de moneroj, medaloj kaj monpapero

- a. MONEROJ & MEDALOJ: 8 kvalitokategorioj (de pli granda al malpli granda aprezado).

PRF (probaĵo) Esperante ‘proba’, angle ‘proof’. La reliefo de la monero (aŭ medalo) estis traktata por igi la metalon nuanciĉa kaj brila. Fabrikataj por kolektantoj.



SF (stampofloro). Monero sen ‘proba’ traktado. Por kolektantoj. Krome ĉiuj moneroj sen difektoj de antaŭ la 19a jarcento estas katalogataj kiel SF.

NC (ne cirkulita). Monero destinita por cirkuli en la merkato. Tamen pro necirkulado sen difektoj.





EBK (elstare bona konservo). Per simpla rigardo oni ne aŭ apenaŭ rimarkas difektojn, tamen montras normalajn spurojn de cirkulado mallonga.

TBK (tre bona konservo). Montras spurojn de regula cirkulado.



BK (bona konservo). Evidentaj spuroj de cirkulado, difektoj, malperfektaĵoj. Valoro ĉirkaŭ duono de TBK.

- **IK** (intermeza konservo). Diversaj difektoj kiel bosumaĵoj, koroditaj reliefoj, grataĵoj ktp.

- **MK** (malbona konservo). Preskaŭ nevideblaj desegnaj kaj nelegeblaj skribaj partoj. Malbrila metalo, multaj difektoj kiel bosoj, fendoj, erodado ktp.

b. **MONPAPER**O: 6 kvalitokategorioj (de pli granda al malpli granda aprezo).

- **SF** (stampofloro). Nova, ne cirkulita, perfekta peco.
- **EBK** (elstare bona konservo). Ege mallonga cirkulado.
- **TBK** (tre bona konservo). Cirkulado postlasis malgrandajn malpuraĵojn kaj etajn faldojn. Grandaj malperfektaĵoj aŭ disŝiroj malestas.
- **BK** (bona konservo). Kolorperdo, disŝiretoj kaj malpuraĵoj, do evidentaj spuroj de uzado.
- **IK** (intermeza konservo). Ĝis 1/8 de la surfaco mankas. Monbileto montras truojn, disŝirojn kaj malpuraĵojn.

Rimarko1: Se la stato de monero, medalo aŭ monbileto troviĝas inter du kategorioj, oni uzas klinitan strion inter ili. Ekzemple: SF / EBK


Rimarko 2: Ekzemplero kun difekto aŭ eraro povas tamen atingi valoregon, ĉar povas esti raraĵo.

Rimarko 3: Monpapero aplikeblas en ĉiu ajn varianto, kiel monbileto,ambio, ĉeko ktp.

Verkita surbaze de: "Numismatiko" en Vikipedio kaj de "Encyclopedie van munten en bankbiljetten" Samson Uitgeverij, Alphen aan de Rijn, 1986

(daŭrigota)

HISTORIAJ ASPEKTOJ



Framasona medalo

1913 – 2013



Dum la 1a Universala Kongreso (Boulogne-sur-Mer) estis fondita asocio “Espero Framasona”; ekde 1906 (UK en Genève) ĝi nomiĝis “Esperanto Framasona”. Dum ĉiuj postaj kongresoj, krom en 1909 kaj 1910, la framasonanoj kunvenis. Dum la UK en Bern (1913) estis fondita pli ampleksa organizo “Universala Framasona Ligo”.

En Parizo, en tiu sama jaro, la loĝio “Esperanto” ricevis sian numeron 454, tiel apartenanta al la “Grande Loge de France”. Okaze de la konsekro Zamenhof sendis gratulleteron.

Tamen, jam en junio 1907 estis fondintaj tiun loĝion Jacques Camescasse kaj Alfred Mitthey. Ses monatojn post la fondo la loĝio havis jam 23 membrojn. La nomo de Zamenhof ne troviĝas en tiu listo. Tamen senĉese oni pridiskutis kaj pridiskutas ĉu Zamenhof estis framasonano aŭ ne.

La terura unua mondmilito (1914-1918) paralizis la loĝion “Esperanto”, tamen ĝi reaktiviĝis dum la Intertempo, do inter la du mondmilitoj.

En septembro 1939 la dua mondmilito eksplodis kaj en 1940 efektiviĝis leĝo malpermesante “sekretajn” asociojn en Francio. Pétain dekretis krome la dissolviĝon de la “Grande Loge de France”, konfiskante ĉiujn havaĵojn. Camescasse kaŝis la arkivojn de la loĝio “Esperanto” en sia domo. Post lia morto en 1941 la Gestapo vizitis la domon kaj forprenis la arkivojn.

En 1965 la tiama loĝiestro de 454 prelegis dum radia elsendo pri “Esperanto et Franc-Maçonnerie”. Li anoncis i.a. ĉiumonatan kunvenon. La loĝio tamen ne refunkciis antaŭ la 30.05 1974. Tiel tamen pluiĝis la agado por “konigi Esperanton al framasonanoj, konigi framasonismon al esperantistoj.”

En 2013 la loĝio solene festis unu jarcenton je la servo de framasonismo kaj de Esperanto. Tiukaze la belega bronza medalo supre estis emisiita.

Tuj kiam ni ne nur disponos pri bonkvalitaj fotoj, sed ankaŭ pri taŭgaj informoj por priskribi la medalon, vi trovos artikolon pri ĝi en la rubriko “Medaloj kaj moneroj”.

Fontoj: “Heroldo de Esperanto” nr.2 de 2014, p.3

Vikipedio: “Framasonismo”

TERMINARO

Alfabeto listo(3):

alojo: *homogena unuigo kaj kunfandigo de du aŭ pliaj materialoj*

bitcoin: *digitala monunujo (vidu en ĉi-numero la rubrikon “El la gazetaro”)*

boso: *reliefa desegnaĵo aŭ figuraĵo farita sur la fono de metalfolio aŭ de ledoj per stampilo aŭ cizelilo*

ĉeko: *pagordono, per kiu la subskribinto ordonas al sia banko, ke pagi ĉe vido la tie skribitan sumon al la nomita profitanto*

cirkulita / necirkulita: *monero, medalo kaj papermono kiuj jes / ne cirkulis en la merkato*

dumetala: *du metaloj, sed ne unuigitaj per kunfandigo (ekz. Eŭro-moneroj de 1 kaj 2 eŭroj)*

ekzergo: *ĉiuj elementoj sub la elstara bordo, ĝenerale en la reverso, kiu kutime enhavas surskribaĵojn koncerne la stampodaton, ktp.*

erodi: *eluzi, elfroti, malakrigi*

fendo: *mallarĝa laŭlonga truo*

probaĵo: *vidu en ĉi-numero la rubrikon “Aspektoj de numismatiko”*

stampofloro: *vidu en ĉi-numero la rubrikon “Aspektoj de numismatiko”*

(daŭrigota)

EL LA GAZETARO

Ekvadoro lanĉas digitalan monunuon

Baldaŭ Ekvadoro estos la unua lando en la mondo kie estos eldonanta far la centra banko digitalan monon. La mono cirkulados kune kun la dolaro, la oficiala monunuon de Ekvadoro ekde la financa krizo de 2000.

La centra banko de tiu latin-amerika lando deklaras, ke ĝi estos jam lanĉata en decembro 2014. Multaj detaloj ankoraŭ ne estas konataj, escepte ke ĝi ne iĝu kriptomo kiel Bitcoin.

Granda diferenco inter ambaŭ estas ke ĝi estos eldonata de la centra banko, kio ne koncernas Bitcoin. Pro tio dubendas ĉu la nova monunuon sukcesos.

La celo de la banko estas envenigi la pli malriĉan parton de la popolo, kiu estas lokaŭtata de la tradicia banksistemo. Tiuj homoj tamen posedas poŝtelefono(j)n. La uzo de digitala mono okazus libervole kaj eblus pagi per poŝtelefono! Tiucele estis disvolvita programaro, dume jam uzata de telekomentreprenoj.

Kritikistoj de la digitala mono la iniciativon konsideras taktikon de la maldekstra estraro de Ekvadoro por pligrandigi la monprovizon kaj tiel plenpagi ŝuldojn. La ŝuldaro sumiĝus je 11 miljarde dolaroj (8,3 miljarde eŭroj).

Analistoj ankaŭ kritikis la permeson por la centra banko krei senfinan kvanton de digitala mono.

El la belga gazeto "De Morgen", 27.08.2014/ redakcia traduko



Alvoko al la legataro de "Esperanta Numismatiko"

- Se vi kapablas verki artikolon pri "Bitcoin", bonvolu sendi ĝin por la 1a numero de 2015 al bert.boon@skynet.be.
- Bonvolu rikolti el via nacia gazetararo artikolojn rilate al (esperanta) numismatiko. Bonvenaj estas ĉiuj artikoloj en Esperanto, la germana, la franca, la angla kaj en la nederlanda.

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

25.9.2014 17:55

Tre kara Amiko,

aldone mi sendas al vi artikolon, aperintan en februaro 2014 en "Heroldo de Esperanto" kaj verkita de Jean Amouroux. La plej interesa afero estas la eldonado de memormedalo pri la franca Loĝio, en kiu aperas nia lingvo. Mi ne havas kromajn informojn, pri formato, eldonato, desegnisto, kiu komisiis la eldonon ks. Mi esploros por ion plian ekscii, tamen mi pensas ke vi povas ion eltiri el tiu artikolo kaj almenaŭ aperigi la bildon de la medalo.

Plej korajn salutojn Elda

PS: mi ne scias, ĉu mi sukcesos per ĉi mesaĝo sendi ĉiujn fotojn, se ne vi ricevos kroman mesaĝon.

Triesta Esperanto-Asocio

www.tea1906.altervista.org

www.karstajtagoj.altervista.org

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

www.elf-arek.wz.cz



5.10.2014 21:19

Dear Sir,

I presume that English is your best second language and I apologize that I can not use your national language. For me English is not my mother-language.

The first time I saw your portrait and a few of your esperantomedals, was in a brochure by Hans Jankowski. So I got interested in those medals of which you created a great deal, isn't it?

About a year ago, being an esperantist and a fan of medals and coins, I decided to start a new association for esperantists-numismatists.

At the end of oktober 2014 the 4th number of our magazine will appear. Our association now has 25 members from different countries and continents. About 12 esperanto-museums and-libraries also receive the magazine.

In that last number I will publish an article about you and your work for esperanto(-medals). Although mister Jankowski shows some of your medals in his brochure, they are all black and white, a kind of copy-drawing.

I once recieved from him a foto of one medal of yours in color. I will show and describe that medal about VLADIMIR SZMURLO in the last number.

I would like, if possible, from you more fotos of other esperanto-medals with a few dates like weight, metal(s), diameter...for the magazine.

If you agree, I will send to you the first 4 numbers of our magazine "Esperanta Numismatiko".

Last question: Do you still have some esperanto-medals for sale? What is the price with shipping?

Kind regards,

Bert Boon

5.10.2014 10:49

Dear Mr. Bert Boon,

my first language is Latvian, but my english is very bad.

I have German language in the shool to learn.

OK.

List of my ESPERANTO medals:

1) AUTORO DE ESPERANTO D-RO L.L.ZAMENHOF 1859-1817, d=91 mm, bronze, 1976.

2) RŪDOLFS LIBEKS 1854-1908, LA UNUA LATVIA ESPERANTISTO,d=88mm, br., 1981.

3) VLADIMIR SZMURLO.1865 - 1931 d=63 mm, br., 1983.
reverse - "RIGA STELO" - LA UNUA ESPERANTO REVUO EN LATVIO

4) JĀNIS ASARS 1877 - 1908 d=72 mm, br., 1984.

5) ESPERANTO REDAKCIO 25 JARA, RADIO POLONIA, 1959.4.IV, d=63,b.,1984.

6) ESPERANTO POETO NIKOLAJS ĶURZĒNS 1910-1959, d=72 mm, br., 1984.

7) ESPERANTO REDAKCIO RADIO POLONIA VARSOVIO. 30 000
ELSENDO,d=71mm,br., 1986.

8) RADIO POLONIA ESPERANTO REDAKCIO VARSOVIO POLONIA.100 000, 67 X 90
mm, br., 1986.

9) VILHELMS OSTVALDS 1853-1932, (NOBEL PRISE IN 1909), d=75 mm, br., 1986.

- 10) ESPERANTO 1887 - 1987 , 78 X 61 mm, bronze, 1986.
- 11) PROF.PĒTERIS ĶIĶAUKA 1886 - 1967 , diameter = 84 mm, bronze, 1986.
- 12) LATVIO ESPERANTO-100. LA LINGVO INTERNACIA 1889, 65 X 72 mm, br., 1989.
- 13) KOLOMANO KALOCSAY 1981 - 1976, diameter =77 mm, bronze, 1989.
- 14) JULIO BAGHY 1891 - 1976, diameter = 75 mm, bronze, 1989.
- 15) PĒTERIS KADIĶIS 1857 - 1923, diameter = 75 mm, bronze, 1989.
- 16) ESPERANTO - POETINO MILDA JAKUBCOVA 1899 - 1979, d =58 mm, br.,1989.
- 17) LAKSHMISWAR SINHA 1905 - 1977, 73 X 62 mm, bronze, 1989.
- 18) TĀLIVALDIS INDRA 1894 - 1942 , diameter = 71 mm, bronze, 1989.
- 19) AUGUSTS KAŽOKS 1881 -1937, diameter = 74 mm, bronze, 1989.
- reverse LA DUA ESPERANTO - REVUO EN LATVIO "ONDO DE DAUGAVA" 1925-1935
- 20) ANDREO CZEH 1895 - 1979, diameter = 67 mm, bronze, 1989.
- 21) EDUARDS JAUNVALKS 1901 - 1989, diameter = 78 mm, bronze, 1989.

Kind regards,
Jānis Strupulis.

ps

The fotos of the esperanto-medals I send one week later.

6.10.2014 19:02

Sehr geehrter Herr Strupulis,

Erstens recht vielen Dank für die schnelle Antwort und für die Liste von Esperanto-Medalien. Ich freue mich schon auf die Fotos für unsere Zeitschrift!

Wie ich schon meldete in meinem "englischen" Brief, sah ich zum ersten Mal Ihr Foto und einige schwarz-weiss Bilder von Ihren Esperanto-Medalien in einem dünnen Katalog von dem deutschen Esperantist und Numismatiker Hans Jankowski. Vielleicht kennen Sie ihn, denn er besuchte öfters Ihr Land.

Ende 2013 hatte ich die Idee einen Verein zu gründen, einen Fachverein für Esperanto-Numismatik, da es noch nie einen solchen Verein gegeben hat in der Geschichte von Esperanto. Der Verein bekam den Namen "Esperanto Numismatika Asocio" (ENA), die dreimonatliche Zeitschrift den Namen " Esperanta Numismatiko". Heute hat der Verein, nach fast einem Jahr schon 25 Mitgliedern aus verschiedenen Ländern und Kontinenten.

ENA hat keinen Vorstand, keinen Vorsitzenden, keinen Kassisten usw, weil die Mitgliedschaft und die Zeitung völlig KOSTENLOS sind und kostenlos bleiben sollen. Ich bin also nicht der Präsident, sondern nur der Initiator und im Augenblick der Chefredakteur der Zeitschrift. Alle Mitglieder können freiwillig Mitarbeiter-Redakteure sein, aber es gibt keine Hierarchie und auch das soll so bleiben.

Eine Postadresse hat ENA nicht, nur die Internetadresse bert.boon@skynet.be. Wir sind kein Verein für Sammler, aber wir streben dazu mit wissenschaftlichen Methoden eine richtige Esperanto- Numismatik zu treiben. Das Ziel soll die Herausgabe eines Katalogs und einer alphabetischen Terminologie sein.

Als Beispiel unserer Arbeit sende ich Ihnen in Beilage die erste Nummer der Zeitschrift, erschienen im Januar 2014 (auf Esperanto, aber Sie werden viel verstehen, glaube ich). Wenn sie Ihnen gefällt, sende ich auch alle andere Nummern zu Ihnen.

Noch eine Frage, bitte: könnte ich für meine persönliche Sammlung bei Ihnen Esperanto-Medalien aus der Liste bestellen?(Ich besitze noch keine von Ihren Medalien!) Wenn ja, sagen Sie mir bitte welche und den Preis, inkluziv Versandkosten nach Belgien. Ich danke Ihnen im Voraus!

Mit freundlichem Gruss,

Bert Boon



ANONCOJ

&

EVENTOJ



Se vi volas relative malmultekoste ĉeesti dum la centa UK en Lille, ne forgesu aliĝi antaŭ la 31 de decembro 2014!

Dum la kongreso nia asocio ENA estos bonvena partopreni en la “10. Movada Foiro dum la UK en Lille” por senpage prezenti sian agadon al la kongresanaro. Ankaŭ nia asocio ricevos spacon ĉe tablo, kie ĝi rajtos prezenti siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj similon (laŭ invito de s-ino Anna Lowenstein okaze de la pasinta 99a UK).

Dum la UK ni ankaŭ volas organizi mallongan kunvenon por membroj de ENA kaj inviti aliajn interesulojn surloke. Tiel ni povos interkonatiĝi kaj ŝanĝi ideojn kaj opiniojn pri numismatiko kaj ENA.

Se vi havus ideo(j)n aŭ sperton koncerne la aranĝon de stando, bonvolu sendi viajn proponojn al bert.boon@skynet.be.

Ĝis tiam!

KOLEKTAĴOJ

prezentu al ni objekto(j)n el via kolekto!

Alvoko: ĝis nun ni vane atendis, sed eble iu(j) baldaŭ havos sufiĉe da tempo kaj da kuraĝo por prezenti al ni unuopan (aŭ pliajn) objekto(j)n el la propra kolekto de esperantaj medaloj, moneroj ktp.

Konsideru vian kontribuadon kristnaska donaceto! Dankon!

Vi konstatas: ni perdas nek kuraĝon nek paciencon! Sed sen via subteno baldaŭ nia projekto suferos pro anemio!